


★ *Ora Ĵurnalo*

Numero 3, januaro 2018

Al la tuta mondo:

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*




La germana preĝejo en Gotenburgo

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Espeporko konsilas



- ⌘ Zorge tralegu ĉiun numeron de Ora Ĵurnalo!
- ⌘ Komentoj kaj artikoloj estas bonvenaj.
- ⌘ Plusendu la ĵurnalon al viaj geamikoj,

admonante ilin fariĝi membro de Ora Klubo (100:- al la pĝ konto 4 36 12 - 1 por unu jaro)!

⌘ Diru al ili ke estas pluraj eblecoj lerni esperanton: Duolingo.com, Lernu.net, Esperantosabato (la unuan sabaton monate), la somera kurso en tri niveloj 26 – 30 junio en Gotenburgo kaj eble ankaŭ aliloke.

⌘ La 15an ĉiun monaton estas Ora-Klubo-kunveno. Pri la aktuala loko rigardu nian hejmpaĝon www.esperanto-gbg.org.

⌘ Nia membro *Monica Eissing* rekomendas legolibrojn por vi – facile legeblajn. Vi povas mendi el nia biblioteko. Rigardu www.esperanto-gbg.org > bokshop !

Jen ŝia propono:

Rekommenderad läsning efter esperantokursen

Ja, vilka böcker kan man läsa efter kursen?

Det finns mycket bra lästlästa böcker på esperanto. När man börjar läsa en bok, och efter några sidor i boken, kan det bli lätt att man ger upp, om man tycker det är svårt.

Så ge inte upp!

Det bästa sättet är att läsa lite varje dag, ca 15–20 minuter. Gör det till en vana, så blir det lättare med tiden.

Nedan nämner jag några författare, som skriver på ett lästläst språk.



Rekomendinda legado post la Esperantokurso

Jes, kiujn librojn oni povas legi post la kurso?

Troviĝas tre bonaj facilaj libroj en Esperanto. Kiam oni komencas legi libron, kaj post kelkaj paĝoj en la libro, oni povas facile rezigni, ĉar oni pensas estas malfacile.

Tamen, ne rezignu!

La plej bona maniero estas legi iomete ĉiutage, ĉirkaŭ 15–20 minutojn. Faru el tio kutimon, tiel estos pli facile iom-post-iom.

Sube mi mencias kelkajn verkistojn, kiuj skribas en facila lingvo.

Monica rekomendas

Lars Forsman: *Sascha ĉe Karlskoga popola altlernejo*

Temas pri germana junulo, kiu venas al popolaltlernejo de Karlskoga por lerni esperanton.

Lernilo

Ankaŭ de la sama verkisto: *Ludoviko Zamenhof*

Esperanto-lernolibro kun ekzercoj por progresantoj.

Lernilo

Båda böckerna kan beställas via denna länk | Ambaŭ librojn vi mendu je

<http://larsforsman.se/esperanto.html>

Bent Jensenius: *Bonvenon en nia mondo*

Temas pri Esperantujo, mendu ĉe UEA.

<https://katalogo.uea.org>

<https://www.goodreads.com/book/show/28939259-bonvenon-en-nia-mondo>

Sten Johansson: *Katrina malfruas / Vojaĝo kun Katrino / La krimo de Katrino*

Lokiĝas en Esperanta medio, mendu ĉe Esperanto-Societo de Gotenburgo.

<http://esperanto-gbg.org> > Bokshop

Claude Piron: *Gerda malaperis*

En la komenco li skribas kun malgranda vortprovizo kaj iom post iom pligrandigas.

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?retrovo=gerda+malaperis&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>

<http://esperantofre.com/gerdakd/gerda.pdf>

<https://www.youtube.com/watch?v=PXjmX2jipQ4>

Andra lättlästa verk av Claude Piron:

Lasu min paroli plu / Ili kaptis Elzan! / Dankon, amiko / Vere aŭ fantazie

<http://esperanto.org.uk/eldonoj/piron/>

Julio Baghy: *La Verda Koro*

https://eo.wikisource.org/wiki/La_verda_koro

Sylla Chaves:

En la kongreso kaj aliaj legaĵoj / Sep leteroj. Facila legaĵo / Nova amiko inter ni

<https://www.estantevirtual.com.br/livros/sylla-chaves>

Edmond Privat: *Karlo*

<http://www.gutenberg.org/ebooks/24525>

<http://cindymckee.com/librejo/KARLO.pdf>

Marjorie Boulton: *Faktoj kaj fantazioj*



Enhavas fabelojn kaj rakontojn de la tuta mondo.

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=644>

Ulrich Matthias: *Fajron sentas mi interne*

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3719>

<http://esperanto.net/literaturo/roman/libr/fajronsentas.pdf>



Kontakto kun niaj legantoj

Reago al la dua numero

- La historio pri Ture Sventon en Varsovio de Folke Wedlin estas tre interesa.
- Ĉu mi povas uzi viajn poemojn por mia franca revuo?
- Ĉu vi volus vidi alian tradukon de Tomten ol tiu en la ĵurnalo? Farita de Tatu.
- Altkvalita ĵurnalo! (Ni dankas!)
- – – sed neniu propono al la alvoko nomi kandidatojn por la estraro de SEF.

Kie vi troviĝas, vi estontaj SEF-kandidatoj???

Pri membreco

Ni konstatas ke troviĝas personoj, kiuj pagis 100:– al la konto 4 36 12–1, sed ni ne estas certaj ĉu la pago celas membrecon en la Gotenburga klubo (sen aliĝo al SEF) aŭ membrecon en Ora Klubo. Ni ne volas du kontojn, ĉar kostas tro. Pri aliaj pagoj, 235:– (por SEF kaj la Gotenburga societo) aŭ 335:–

(kaj al SEF, kaj al la Gotenburga societo, kaj al Ora Klubo) ne estas duboj. Kelkaj ankaŭ pagis pli. Ni dankas pro tiuj donacoj!

Propono

Se vi sidas en trajno, kafejo k.t.p. kaj volas legi ion, vi povus kunporti libron kun granda esperanta teksto. Kiam mi sidis en trajno inter Stokholmo kaj Gotenburgo, mi metis etan libron "La skurila libro" el nia biblioteko sur la tablon. Mi nur atingis paĝon 15 kun la rubriko "Decido malfacila". Patrino kun 8-jara filino sidis ĉe la sama tablo.

– Ĉu estas hispana libro? – Ne. Divenu pli! – Ĉu itala? – Ne. – Ĉu portugala? – Ankaŭ ne... Estas esperanta libro! ... Kaj la interparolo komenciĝis. Plej facile por mi estis informi pri nia gotenburga hejmpaĝo, de kie multaj ligiloj iras al aliaj paĝoj – kaj kompreneble al Ora Ĵurnalo. La patrino enskribis la retadreson en sian poŝtelefonon.

/Siv



Novjara saluto el Samarkando



2017-12-21 19:51

Samarkandiana <imps86@yahoo.com>

Karaj geamikoj,

Dum la 2017-a alproksimiĝas al la fino, ni

deziras al vi kaj al ĉiuj viaj proksimuloj Serenan Kristnaskon & Sekuran, Brilan kaj Feliĉan Novan Jaron!

Dum ĉiu tago de la 2018-a vi ĝuu bonan sanon, bonan ŝancon, bonan tempon kaj bonajn novaĵojn!

Belajn festotagojn,

Anatoli kaj familio

Julfesto ĉe Helfrid Karlsson en Torslanda

La 16an de decembro Esperanto-Societo de Gotenburgo havis kontribufeston ĉe Helfrid, kiu i.a. regaligis nin per rizkaĉo.



Ĉi tiun fojon inter ni estis norvega muzikisto, Gard Nergaard, kiu ĝojigis nin per siaj mem komponitaj kanzonoj. Unue li rakontis historion pri la enhavo de ĉiu kanzono kaj poste ludis la melodion per sia violono. Li nun loĝas en Gotenburgo, sed ofte troviĝas en turneoj kune kun la gitaristo, Mikael Krummin, ankaŭ li el Norvegio. La nordiaj landoj ne

sufiĉas por ili. Ekz. ili tempe loĝis kaj ludis en Malavio, sed plej ofte, tamen, en Norvegio.



Ĉar ne eblis havi Ora Klubo-kunvenon la 15an kiel kutime, Ingegerd kontribuis al la programo per taskoj, kiujn ni trovis en oraj kuvertoj. Ekz. "kantu svedan kanton, kaj igi la aliajn esti publiko kaj imiti ĉiun strofon!". Nu, la esperantistoj bone kantas... Ni nur devus havi gvidanton, kiu fondus ĥoron.

Ni tre dankas al Helfrid kiu ebligas al ni daŭrigi la tradicion havi julfeston en Torslanda!

Ni ankaŭ provis skribi hajkojn. Sube vi trovos ilin.

Jen la rezulto de la defio mem krei hajkojn

Lasse, Margareta kaj Gard:

1. Dum jula pluvo
Gotenburgo aŭskultas
miraklajn gutojn.
2. Vintrovetere
varme nin bonvenigas
gastigantino.
3. Neĝflokaj falas
koboldaroj alvenas
donacojn donas.

Roger kaj Ingegerd:

1. La kato sidas
ĉe la granda fenestro
vidas la vulpon.
2. La vulpo kuras
sur la verda herbejo
kaj ĝi malsatas.
3. Leporo kuras
pro la tuta gaja viv'
ĝi havas idojn.

4. La strigo sidas
en la granda arbego
ĝi volas manĝi.

5. La luno ridas
ĝi ridetas kaj brilas
koboldo dormas.

Inga kaj Andreas:

1. Hejme ĉe Helfrid
bonaj kaĉo kaj etos'
ni tre dankemaj.

2. Luma vespero
julaj lampoj ekstere
sur grundo neĝo.

3. La gastoj dankas
la gastiganton kore
pro jula festo.

4. Muzika ludo
inter esperantaj vortoj
bona ekzerco.

El *Vikipedio*: Hajko (el japana 俳句, haiku) estas tradicia japana poeziaĵo konsistanta el unu vertikala 17-silaba linio, enhavanta tri fonetikajn partojn de 5, 7, 5 silaboj. En Esperanto hajkoj aperas en tri horizontalaj linioj de 5, 7, 5 silaboj. Enhave la hajko iel aludu al iu sezono de la jaro.

Kiel nomi la seksojn esperante?

Tion ni diskutis dum la julfestoj 2017 kaj poste Inga Johansson trovis ĉi tiun malnovan artikolon. Do, la problemo ne estas nova.


El Mondo 199:2 (Oskar Svantesson) 83-10-12

Ĉu la junulo estas nur viro?

En Semajna Bulteno ekestis debato pri la "seksismo" de Esperanto. Tiu seksismo ĉefe konsistas el tio, ke oni por esprimi la virinan econ de estaĵo aldonas sufikson, dum la vira eco estas honorata per memstara radiko.

Unua ekzemplo pri tio ja estas la radiko "viro", al kiu oni aldonas "-in" por formi la inan ekvivalenton. Same okazas pri metianoj: tajloro – tajlorino, instruisto – instruistino, kuiristo – kuiristino, ktp. Tiu maniero etendiĝas ankaŭ al la bestoj: bovo – bovino, koko – kokino, leono – leonino, ktp.

Entute, tra la tuta vivo oni trovas, ke la ino estas ia aldonaĵo al la vira estaĵo. Tio estas iaspeca malplivalorigo de la virino. Tio ne konvenas al moderna lingvo! Du ensendaĵoj proponas, ke la radiko mem esprimu nur la specion de la kreitaĵo, kaj neniel signu ankaŭ la sekson.



Por tio oni uzu laŭ unu "-iĉ" laŭ alia "-im" por la vira sekso. Nu, la red. de *Mundo* pripensis la saman aferon. Kiam mi en mia ĝardeno vidas pigojn, mi tute ne povas diri, ĉu mi vidas pigon, aŭ piginon.

Tio validas por multaj bestoj. Do, estus oportune, se "pigo" signifus sole la specion "pigo", sen distingo pri sekso. Nun verkinto postulas, ke la vorto "junulo" signifnu la ambaŭ seksojn. "Junularo" ne povas signifi nur aron de junaj viroj.

Simila estas la afero kun "parlamentano", "kuracisto", "prezidanto" ktp, ktp. Sed la Mundo-redaktoro ne povas samopinii, ke la sufikso "-im" estas taŭga por esprimi viran sekson. Ĝi estas multe tro simila al "-in" por povi esti uzata. Kontraŭ "-iĉ" mi samopiniis kun s-ro Pirlot, ke ĝi estas aĉa. Mia propono pri virmontra sekso estas "-ur". Ĝi iel estas pli forta, pli esprimpova. Kaj eĉ iom brutala! Tio lasta eble devenas el la fakto, ke ni havas la radikvorton "-ur" por besto, kiu laŭ bildoj ne aspektas precize milda. Sed kolizion inter la ur-ojn ni ne bezonas timi. Kiomfoje vi uzas la radikon "-ur" la esperantistoj uzas milionojn kaj ree milionojn da vortoj antaŭ ol ili renkontiĝas kun tiu "-ur". Pli grave estas, ke la


neoficiala sufikso "-ur" aperas en kelkaj vortoj, kiaj "cenzuro", "aperturo", "diktaturo", k.a.

Sed la kunteksto certe sufiĉos por eviti miskomprenojn. Do, ni viroj estonte estos "homuroj", kaj la antaŭaj virinoj estos "hominoj". Ĉar la radiko "vir-" ja malaperu, ĉu ne?

Mia komento al tiu, kiam mi kopiis la tekston el Mundo. Eble Oso (Oskar Svantesson) skribis tiun proponon kun eta vulpo malantaŭ la orelo. Li tute ne memorigas nin pri "ge-".


Inga Johansson

Juna membro de la Gotenburga klubo



Gard Nergaard estas talenta muzikisto, kiu bone ludas norvegan popolmuzikon per sia violono kaj rakontas norvegajn popol-rakontojn. Mi foje aŭskultis lin en la Domo de

Muziko en Gotenburgo. Li kaj lia gitaristo havis sorĉistan prezentadon. Spite al la juna aĝo li estas mondĉivitano kaj vojaĝas multe. Ni en la Gotenburga Esperantoklubo fieras pri nia membro Gard Nergaard.



Eble ankaŭ vi volas aŭskulti la norvegan muzikon de Gard? Bona novaĵo! Gard kaj lia gitaristo eldonis kompaktan diskon kun sia popolmuziko. Bv kontakti la gotenborgan klubon por aĉeti la diskon! /Ingegerd

Anekdoto

NIAJ ETULOJ – La patro: "Kial Georĉjo krias tiel?"

Eta Elinjo: "Ĉar mi montris kiel li faru por manĝi sian kukon."

Babilo pri danco!



Tiuj ĉi personoj faras multe por la esperanta kaj popola movadoj kaj vivo en la esperanta solidareco.

Virino unue...

En la pasinta somera kurso en Gotenburgo *Siv Burell* ĉasis la lernantojn ĉirkaŭe en la ĉambro kun emo kaj vivo. Temis pri la liniodanco kun turnoj norden, suden, orienten kaj okcidenten.



Martin Strid (dekstre) kondukas la dancon en Gotenburgo.

Forto due...

En la aliaj partoj de Svedio *Martin Strid* enkondukas la longan dancon de la Feroaj insuloj. Tagnokton post tagnokto, horon post horo li dancas kun ĉiuj, ĉiuloke.

Li estas tre afabla energiulo.

/Ingegerd

Inga Johansson rakontas



Mia rakonto komenciĝas jam en la jaro 1931 en Viborg, Karelio. Tiam "mia finna frato" naskiĝas. La patrino Berta havas nur filojn kaj "mia frato" estas la plej aĝa. Oni sendas lin kiel "militinfanon", 11 jara, al Svedio al la familio de miaj geavoj (patrina flanko).



Tie jam estas 6-jara knabino de Parikkala. Ŝi pli frue venis kun 4-jara frato, sed lin prizorgas alia familio en Svedio. Tial ŝi nun elektas la 11-jaran knabon el Viborg, Karelio, el nova grupo de infanoj. Ambaŭ geknaboj restas dum la milittempo ĉe mia familio, poste revenas al Finnlando.

”Mia finna fratino” iris reen al tiu parto de suda Karelio, kiu restis finna lando tre proksime al urbo Imatra. ”Mia finna frato” ne povas reiri al Viborg, kiu nun estas en Ruslando. Sed li reunuiĝas kun siaj familianoj en Raŭmo, norde de Turku.

Tamen ili revizitas Svedion en la jaro 1951, kiam mi havas unu jaron.

1965 mi por la unua fojo povas viziti Raŭmon, kaj en 1967 mi restas dum la somero kiel gastvartistino (au pair). ”Mia frato” nun havas edzinon kaj tri infanojn.

En la jaro 1972 mi denove estas en Raŭmo kaj tiam renkontas liajn gepatrojn. Mi fotas lian patron, kiu nun estas militinvalido (unu kruro for) kiam li montras mapon de Karelio kaj bildon de iama bieno ekster Viborg. Dum li militis la familio dufoje fuĝis tra la karelia arbaro kun la bovinaro.

Berta kudras por mi jakon (iun similan jakon havas la finna glacihokea teamo, kiujn ŝi jam kudris al ili). Ŝi faras la plej bonajn kareliajn piirakkajn (pasteĉojn) mi iam gustis.

Tempo estas nun 1980 kaj mi renkontas ”mian finnan fratinnon” en Imatra.

Dum kelkaj jaroj mi uzis esperanton kiam mi ie vojaĝas. Kompreneble mi kontaktis la esperantoklubon de Imatra. Tie, i.a., estas iama altoficisto de Viborg. Dank’ al li la urba gazeto de Imatra interesiĝas pri mia vizito kaj juna ĵurnalistino Päivi intervjuas nin en gazeta oficejo.

Estas la tempo de Pasko kaj ŝi kompreneble volas scii: Kiel vi salutas je la Pasko? Mi respondas: Bonan Paskon, kaj ŝi decidas meti tiun rubrikon al la gazetartikolo. Bonan Paskon – Hyvää pääsiäistä.

”Paskon” similas al finna fivorto kaj ŝi kredas ke homoj tial certe legos la artikolon.

Al la kluba renkontiĝo vespere venas loka esperantisto biciklante kun granda torto sur la pakaĵtenilo. Hazarde estas mia naskiĝtago kaj por la unua fojo mi manĝis torton kiu veturis sur biciklo.

Kun Esperanto mi poste ankaŭ vizitis Trondheim en Norvegio, Newcastle kaj Morecambe en Britio, Groningen en Nederlando, Picanica en Bulgario kaj Dümmerlohausen en Germanio.



Inga Johansson

Kerstin Rodin: Mia vizito en centjara Finnlando 2017

La jaro 2017 prenas siajn lastajn paŝojn, siajn finajn paŝojn. La suno apenaŭ havas la forton leviĝi super la horizonto. La grizaj nuboj kaj densa nebulo kredigas al ni en la nordaj landoj, ke nokto vizitas nin dum tuta diurno. Ni homoj, kiuj loĝas en la nordaj landoj, kie ni en junio festas, ke la suno brilu por ni tutan nokton kaj permesu al ni, ke ni dancu ĝismatene. Nun ni vidas, ke la suno lacas kaj bezonas nian helpon por doni al ni iom da lumo. Ni komence de

novembro metas la adventajn kandelojn kaj stelon en niaj fenestroj por atendi Kristnaskon. En Svedio nin vizitas la 13-an de decembro la Kandelojn-portantino Sankta Lucia. En nigra malhela mateno ŝi vizitas la ankoraŭ dormantan familion, vekante la dormantojn per kantado, kafo kun specialaj kukoj kaj varma spicita vino, ”glögg”. Tion oni faras por konvinki la sunon reveni al nia lando.

En Finnlando oni festas la nacian tagon la 6-an de decembro, la Tagon de sendependeco. Tiam en multaj domoj/loĝejoj la loĝantoj metas du lumigitajn kandelojn kiel memoro pri tiu evento en 1917. Tio signifas, ke en la nuna jaro oni festas 100-jaran jubileon de la sendependeco.

Mi estas invitita de mia amikino, Saliko, por festi tiun grandiozan eventon kun ŝi. Alvenante en la landon mi tuj rimarkas, ke la lando multmaniere preparas sin. La ĉefurbo Helsinko estas plena de lumo, lumaj dekoracioj en formo de lustroj, majuskulaj A laŭ Aleksandrostrato, lumigataj domoj; parlamentejo, katedralo, universitato.

La tagon antaŭ la vera festotago la stratoj de la urbo plenis da lumo. Kvazaŭ fulmoj da lumo ĵetiĝas inter la domoj. Amasoj da homoj vagas en la centro de la urbo. Grupoj kolektiĝas por kanti. La etoso plenas da ĝojo kaj feliĉo. Kun Saliko mi estis invitita al vespera jubilea festo. Kvindek de geamikoj de ŝia filino kolektiĝis por festi en gaja etoso. Kvinteto kantis plurfoje dum la vespero.

Fine mi en esperanto salutis Finnlandon interprete de Saliko. Mi gratulis Finnlandon per kvar fortaj hurraoj. Multe da reklamo pri esperanto okazis ĉe diversaj tabloj dum tiu vespero. Pluraj de la aŭskultantoj komprenis la ideon pri esperanto. Pluraj el la gastoj parolis ankaŭ svede.

Post longa, agrabla festovespero Saliko kaj mi vojaĝis al ŝia hejmo per trajno. Ĉe la stacidomo de Hyvinkää, kien ni alvenis post la 1-a horo en la nokto, ni havis la ideon promeni al la tombejo por bruligi kandelojn honore al tiuj personoj, kiuj mortis en la civila milito en 1918. La tombejo en la nokto plenis de kandeloj sur multegaj tomboj de soldatoj. La promenado tra la urbo Hyvinkää sub milde falanta neĝo kaj la plena luno akompananta nin alte surĉiele estis kiel neforgesebla, fabela songo. La mondo lumis de pure blanka neĝo. Ni venis al la hejmo

de Saliko post la 3-a horo post plene festa tago.



Saliko kaj Kerstin

Venontan tagon ni spektis en televido "La grandan inviton al la kastelo de la prezidento". Ĉirkaŭ du mil homoj estis invititaj por "saluti" la prezidentaron. Invititaj estis la veteranoj de la milito, sed ankaŭ personoj, kiuj faris eksterordinarajn servojn aŭ laborojn en diversaj fakoj por la lando dum la jaro aŭ dum siaj vivoj. Estis kortuŝe vidi la veteranojn/maljunulojn, iuj eĉ en rulseĝo. La "salutado" de la prezidento daŭris dum multaj horoj. Intermiksiĝis diversspecaj programoj, kantado, muzikado, dancado, ĉio en plej festa etoso. La festo finiĝis per eleganta, grandioza piroteknikaĵo por honori centjaran sendependecon de Finnlando. Estis la plej bela piroteknikaĵo, kiun mi iam vidis.

Dimanĉe ni vizitis Fölisö (Skanseno de Helsinko). Tie la Julo jam komenciĝis por infanoj kaj plenkreskuloj. Multo en malnovspeca maniero. Ludoj, kantoj kaj dancoj de malnovaj julokantoj, spickukoj, trinkado de glögg (varma, spicita suko). Homoj kunportis kafon kaj manĝon. Fine venis Sankta Lucia kun siaj sekvantinoj kaj kantis malnovajn kantojn. Krepusko falis dum ni sur glitaj vojoj vojaĝis hejmen. La Julo de nia infanaĝo plenigas niajn korojn kaj cerbojn.

Alian tagon ni vizitis ekspozicion de infanpenetraĵoj el multaj landoj. Dum deko da jaroj la kultura sekcio en Hyvinkää anoncis por ricevi

bildojn de infanoj el la mondo. La ekspozicio kaj la bildoj fariĝis pli kaj pli bonaj de jaro al jaro. En la kolekto troviĝas 100 000 bildoj el kiuj eblas prunti por portempa uzo. La ekspoziciejo kaj ankaŭ artlernejo por infanoj troviĝas en malnova ŝpinejo-fabriko. Kia bonega ideo!

Ĉion tion mi havis eblecon travivi dankon al mia bona amikino Saliko en Esperantio/ Esperantolando. Mi kvazaŭ jam festis mian Julon. DANKON!

Kerstin deziras al vi ĉiuj bonan Kristnaskon kaj Bonan Novan Jaron 2018.

Novjaraj promesoj

”Mi promesas neniam promesi ion por la estonta jaro”, mi diris, sed laŭ diversaj revuoj la svedoj ŝatas fari promesojn por 2018.



Laŭ gazeto Metro

1. 40% Pli da korpa moviĝo
2. 31% Malplipeziĝi
3. 26% Ŝpari pli da mono
4. 25% Gajni pli da mono
5. 22% Aliaj
6. 17% Vojaĝi pli
7. 16% Pli da tempo por la familio kaj geamikoj
8. 12% Ĉesi fumi
9. 10% Ŝanĝi laboron

10. 7% Trovi partneron
11. 7% Mi ne scias

(YouGov)

Laŭ Året runt

1. 31% Vojaĝi pli
2. 24% Stresi malpli
3. 23% Pli da korpa moviĝo
4. 17% Ŝpari pli da mono
5. 17% Malplipeziĝi

Laŭ Femina

1. 44% Malplipeziĝi
2. 19,5% Ĉesi manĝi malsanigan manĝon
3. 16,5% Lerni ion novan
4. 15% Viziti novan landon
5. 14% Pasigi pli da tempo en la naturo

(Fonto: Canon FEMINA)

Komento: Metro permesas al si uzi pli ol 200%, Året runt kaj Femina iomete pli ol 100%.
Karaj legantoj: Bv klarigi por mi kial oni ne limigas la procentojn al 100% ? /Siv Burell

Kiu inventis niajn unuojn de tempo?

Antaŭ 4 000 jaroj la babilonoj, kiuj vivis en la lando kiu nun estas Irako, inventis la unuan kalendaron, kiu disdividis la tempon laŭ la movoj de la planedoj en jarojn, monatojn kaj semajnojn.

La septaga-semajno verŝajne devenas de la kosmo. La Babilonoj konis sep astrojn: la sunon, la lunon, Marton, Jupiteron, Merkuron, Venuson kaj Saturnon.

En la iama Egiptio oni disdividis la tempon kiam la suno troviĝas super la horizonto en

12 partojn per helpo de sunhorloĝo. La dekduonojn oni nomis horoj.

La romanoj donis al ni la nomojn de la monatoj:

Januaro kaj Februaro estas aldonitaj pli poste kaj signifas la dio Janus kaj la puriga festo "Februa".

Marto, nomita de la militdio Marto.

Aprilo – eble derivita de la verbo "aperire" = malfermu!

Majo kaj Junio nomitaj laŭ la diinoj Maia kaj Juno.

Julio kaj Aŭgusto, nomitaj laŭ Julius Caesar kaj la imperiestro Aŭgusto.

Septembro = la sepa monato, **Oktobro** = la oka, **Novembro** = la naŭa kaj **Decembro** = la deka monato.

Do, Marto estis la unua monato de la romanoj. Tiu monato estis la unua monato,

kiam eblis militi, ĉar antaŭe la vojoj estis tro humidaj.

Nuntempe ni ofte en Svedio vidas la mallongigojn *vt*, *v.t.* aŭ *e.v.t.* = enligita vortaro tideräkning (= laŭ nia kronologio) kaj *fvt*, *f.v.t.* = före vortaro tideräkning (antaŭ nia kronologio). Estas la termino por jardatoj laŭ la gregoria kalendaro celita ne esti ligita al la kristianismo. /Siv



La bildo devenas el kolekto de Alain Roze en Facebook

Pri lingvoj

Knabino parolas la francan facile, flue kaj kun granda art'.
Knabino uzas la hispanan tute perfekte en ĉiu part'.

Ankaŭ mi volas paroli france ankaŭ lingva volus esti mi germane, angle kaj hispane, povi esprimi pensojn al vi.

Kiel infano oni senpene akiras elparolon de la gepatra lingvo, kaj gramatikon oni regas sen havi daŭran edukadon kaj facile oni komprenas semantikon.

Ĉirkaŭ 6 000 lingvoj troviĝas entute tro malmultajn mi regas mem troviĝas personoj, kiuj poliglote uzas pli ol ses lingvojn sen problem'.

Dum multaj jaroj oni provis krei mondlingvon por la mond'.
Ido, Mondial kaj Volapük aperigis sed malaperis en la lingvo-ond'.

Sed ankoraŭ vivas ruzlerta Esperanto kaj post ĉirkaŭ cent jaroj – eble pliaj – ĝi certe estos lingvo-venkanto ĉar tiam la homoj estos pli saĝaj ol hodiaŭ.

Almenaŭ mi esperas tion. /Siv



La 2an de januaro mi aŭskultis radian programon pri poliglotoj. Poligloto estas persono, kiu flue parolas ses lingvojn aŭ pliajn. Sciencistoj trovis ke estas pli da viroj ol virinoj, kiuj konas multajn lingvojn. Kial? Ĉu

viroj havas pli da tempo por "kolekti lingvojn"? Eble ili fokusas sur kolektado.

Amuze estis aŭskulti personon, kiuj en nur du minutoj parolis vortojn el preskaŭ ĉiu lingvo. La rapideco estis grandega kaj mi ne sukcesis identigi eĉ unu vorton.

La poliglotoj kutime ne partoprenas kursojn, ĉiukaze nur komence. Ili aĉetas gramatikojn kaj eksperimentadas kun la vortoj. Tre frue ili prenas kontakton kun tiuj, kiuj parolas la celitan lingvon. Ofte ni evitas provi paroli ĝis ni atingos sufiĉan altan nivelon – sed la poliglotoj ne... Ili ne timas la erarojn sed prenas ĉiujn okazojn praktiki la novan lingvon.

/Siv

Mikael Parkvall pri Esperanto

Mikael Parkvall har i decembro haft 24 inlägg i "Språkluckan" i Svenska Dagbladet. Här följer några:

Först om esperanto

15 december [...] "Under mellankrigstiden såg esperanto fortfarande ut att ha relativt goda chanser att bli det språk som alla skulle lära sig utöver sitt modersmål, och använda för internationell kommunikation [...]"

De flesta diktaturer avskydde idén, eftersom den appellerade till suspekta kosmopoliter, och i den fria världen kom USA att bli dominerande vilket ledde till att relativt få ifrågasatte att engelska blev det förhärskande. [...]"

När Wikipedia var nytt, var esperantisterna exempelvis tidiga att haka på – i början av 00-talet var esperanto där det fjärde största språket – men har idag halkat ner till 32:a plats [...]"

Det riktigt stora genomslaget har dock uteblivit. En del hävdar att det beror på att esperanto saknar särskilda nyanser och inte är kulturbärande. Men det har givits ut över



Mikael Parkvall havis en decembro 24 kontribuojn en la "Lingvoklapo" en la ĵurnalo Svenska Dagbladet. Jen kelkaj:

Unue pri Esperanto

15an de decembro: "Dum la intermilita periodo, Esperanto ankoraŭ ŝajne havis sufiĉe bonajn eblecojn fariĝi la lingvo, kiun ĉiuj lernos krom sian gepatran lingvon kaj uzos por internacia komunikado.

La plej multaj diktaturoj malestimis la ideon, ĉar ĝi apelaciis al suspektaj kosmopolitoj, kaj en la libera mondo Usono fariĝis reganta, kio kaŭzis relative malmultajn pridubojn pri tio, ke la angla fariĝis la ĉefa lingvo. [...]"

Kiam Vikipedio estis nova, la esperantistoj ekz. estis fruaj uzi ĝin – komence de la 00-aj jaroj, Esperanto estis la kvara plej granda lingvo – sed hodiaŭ ĝi falis ĝis la 32-a loko [...]"

La vere granda sukceso tamen, mankas.

Iuj argumentas, ke tio estas, ĉar Esperanto malhavas specialajn nuancojn kaj ne enhavas kulturon. Sed pli ol 25 000 libroj estas publikigitaj en Esperanto, kaj principe ĉiuj klasikaĵoj de la monda literaturo estas tradukitaj.

25 000 böcker på esperanto, och i princip alla världslitteraturens klassiker finns översatta.

Det finns också en omfattande originallitteratur som omfattar poesi, romaner och fackböcker.

Därutöver produceras även ett stort antal tidskrifter, och, som sagt, en hel del webbsidor. [...]

Man kan vara avogt inställd till esperanto av diverse skäl, men den som hävdar att språket är inherent oförmöget att uttrycka det som övriga språk kan, måste helt enkelt anses ha fel tills motsatsen har bevisats."

Ytterligare några inlägg (förkortade)

6 december: *Hotas det svenska språket av invandringen?* [...]

Slutsats: Nej, påståendet är en myt. ...

Om framtidens svenskar kommer att ha något annat än svenska som modersmål, kommer det i så fall att vara engelska (eller dess eventuella efterträdare som världsspråk), men knappast de typiska invandrar-språken som arabiska eller kurdiska.

8 december: *"What – de flesta kan väl engelska?"* [...]

Slutsats: ... Nej, det är en myt... Engelska är världens utan tvekan viktigaste internationella språk och kommer sannolikt att förbli det ett tag framöver.

Men likväl begriper fyra av fem jordbor inte ett ord (eller åtminstone inte mer än ett ord) engelska. Och detta oavsett hur högt man pratar.

18 december: *Svenskar bland de bästa i världen på engelska?* [...]

Slutsats: Ja, påståendet är sant. Att svenskar kan engelska i högre utsträckning än de allra flesta är ställt utom all tvekan. Exakt hur bra vi talar engelska i förhållande till vår egen uppfattning är dock svårare att fastställa.

23 december: *Har engelskan större ordförråd än svenskan?* [...]

Ekzistas ankaŭ ampleksa originala literaturo, kiu inkludas poezion, romanojn kaj faklibrojn.

Krome, granda nombro da revuoj ankaŭ estas produktataj kaj, kiel dirite, multaj retaj paĝoj...

Oni povas malfavori Esperanton pro diversaj kialoj, sed tiu, kiu asertas, ke la lingvo ne povas esprimi tion, kion aliaj lingvoj povas, simple devas esti konsiderata malĝusta, ĝis la kontraŭo estos pruvita."

Pliaj kontribuoj (mallongigitaj)

6an de decembro: *Ĉu la sveda lingvo estas minacata de la enmigrado?* [...]

Konkludo: Ne, la aserto estas mito... Se la estontaj svedoj havos ion alian krom la svedan kiel denaskan lingvon, tiam ĝi estos la angla (aŭ ĝia ebla posteulo kiel mondlingvo), sed apenaŭ la tipaj lingvoj de enmigrintoj, kiel la araba aŭ la kurda.

8an de decembro: *"Kion? – La plej multaj homoj ja scias la anglan?"*. [...]

Konkludo: ... Ne, tio estas mito ... La angla sen dubo estas la plej grava internacia lingvo kaj verŝajne restos tia iom da tempo.

Tamen, kvar el kvin teranoj ne komprenas eĉ unu vorton (aŭ almenaŭ ne pli ol unu vorton) de la angla. Kaj ne gravas kiom laŭte vi parolas.

18an de decembro: *Svedoj inter la plej bonaj en la mondo pri la angla?* [...]

